Sennacieca Asocio Tutmonda en Hispanio

# INFORMILO

**Numero 9/eo**

**Oktobro 2007**

## ELDONA FAKO KOOPERATIVA DE SAT


Komence de 2007 estis kreita la nova **Eldona Fako Kooperativa** de Sennacieca Asocio Tutmonda, post referendumo sekve al propono en la beograda SAT-kongreso de 2006. Ĝi celas faciligi la plenumon de la statutaj taskoj de SAT per eldono de kleriga materialo, pretigita kadre de kolektiva laboro kaj kun laŭeble kohera eldonpolitiko, ankaŭ kolektive difinita.

La eldona fako estas kooperativa. Tio signifas ke ĝi financas siajn eldonojn per la profito akirita dum la vendo de antaŭaj eldonoj. Tiu sistemo ebligas ankaŭ eldonon de valoraj libroj, kies vendebleco estas limigita.

Kvankam la eldonprezoj por la paperaj eldonaĵoj de la kooperativo estas kiel eble plej malaltaj, ili tamen certe restos tro altaj por kelkaj kamaradoj. Tial estas antaŭ-vidite senpage havigi 10 procentojn el ĉiuj eldonitaj libroj al nepagipovaj kamaradoj. La eldona fako celas zorgi ankaŭ pri elektronikaj eldonoj, por faciligi la diskonigon de dokumentoj ne adaptitaj al la papera formato, kaj plu plialtigi la kvaliton de la SAT-kultura retejo.

La unua papera libro de la Kooperativo temas pri tre malnova kaj bedaŭrinde denove aktuala temo: **“Mortopuno – Faktoj & Dokumentoj”**.

La libro dividiĝas en tri partoj. En la unua, artistoj levas diversajn demandojn pri mortopuno. En la dua parto, kondamnitoj mem esprimiĝas. Kaj fine venas kompilaĵo el faktoj kaj argumentoj favore al la abolo de mortopuno. El ĉio tio la legantoj esperеble ĉerpos pensigan materialon, kiu ebligos al ili akiri propran opinion pri la temo, kaj eventuale el tio eltiri praktikajn konkludojn por plua agado en la kadro, kiun ili mem opinios plej oportuna por tio.




La verko estas kolektiva, kun interveno de pluraj aŭtoroj. La fakto, ke dudeko da kamaradoj iel kontribuis al ĝia pretigo jam estas kuraĝiga punkto, kaj unua paŝo al pretigo de dokumentoj pri sennaciece pritraktitaj temoj, eĉ se ne ĉiuj mondopartoj estis ekvilibre pritraktitaj ĉi-foje.

La Kooperativo ankaŭ komencis enretigi tekstojn en elektronika formo (pdf), legeblaj senpage kaj surekrane en la adreso: http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/. La unua, la kvazaŭ fonda teksto de SAT: “For la neŭtralismon!”, de Eŭgeno Lanti. Vera bibliografia kaj historia juveleto.

Ĝi ankaŭ eldonis novajn glumarkojn kaj T-ĉemizojn, kiujn eblas akiri ĉe SAT-en-Hispanio.

# 80-a SAT KONGRESO

La 80-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis la lastan semajnon de julio 2007 sude de Parizo, Francio, kaj pli precize la kongresejon kaj la restadejon gastigis respektivaj universitataj instancoj de urbetoj Antony kaj Châtenay-Malabry. Partoprenis inter 100 kaj 150 kongresintoj, depende de la tago kaj la programero, bedaŭrinde ĉefe el Eŭropo. Ĉiukaze ili profitis la okazon por viziti interesegan urbon kaj samtempe partopreni en la ununura Esperanto-kongreso kie la ĉefa intereso estas implikiĝo en socipolitikaj aferoj el progresema vidpunkto, kiel taŭgas en laborista asocio.

Tiele ekzemplaj temoj traktitaj dum debatoj estis la pasinta Monda Socia Forumo okazinta en Kenjo, malarmado kaj senminigado, solidareco kun handikapuloj aŭ kontraŭ malsato, liberaj programoj, manipulado de semoj kaj multaj aliaj pri kio engaĝitaj esperantistoj devus opinii kaj agadi. Krome kaj kompreneble okazis ankaŭ la kunsidoj pri la vivo de SAT, kie oni diskutis pri la ŝanĝoj en la vivo de la asocio, ekzemple per nova skipo por la redaktado de Sennaciulo, per novaj taskoj por SAT-rondoj aŭ la Poresperanta Fako, per la novbakita Eldonkooperativo (vidu pasintpaĝan artikolon) kiu povis montri dum la kongreso siajn ĵusajn eldonaĵojn, nome libron pri mortopuno, T-ĉemizojn kaj glumarkojn.




SATanoj kaj neSATanoj profitis la kongreson por viziti Parizon, ĉiam vizitenda, ĉu unuope, arete aŭ dum kongresaj ekskursoj. Unu el tiuj, la plej emocia, alportis grupon de kongresantoj post la spuroj de la pariza Komunumo. Ni ricevis informon pri la revolucio de 1871, la lokoj kie tio okazis kaj kio okazis en ĉiu loko kun aparta vizito al la tombejo Père Lachaise kie estis entombigitaj ne nur multaj masakritaj komunumanoj, sed ankaŭ aliaj revoluciuloj kaj eĉ famuloj (la apuda bildo reprezentas la monumenton al la hispanaj batalantoj en la franca rezistado kontraŭ la nazia okupado). Alia ekskurso vizitis hejmon de handikapuloj, alia artometiejon, metalfandejon kaj enkamparajn muzeon, kastelon kaj ĝardenon, ktp.

Nokte estis tempo kaj okazaĵoj por distri sen forgesi la socipolitikan tendecon de la kongresanta organizo. Franciska Toubale teatrumis pri militaj problemoj kaj historiaj diferencoj inter japanoj kaj ĉinoj, blindulo Famo koncertis per sia akordiono emocie francajn kantojn ĉu rekte ĉu tradukitajn kaj impresis nin per sia lertego, aliaj gitaristoj kaj kantistoj bildigis restajn noktojn kaj finfine la lasta nokto la koncerto de Jomo kaj la Liberecanoj.

Aliaj interesaĵoj de la kongreso estis la vizito al la SAT-sidejo aŭ la konstato pri la vivo de la frakcioj (revigliĝis la Liberecana, kiu verŝajne reaperigos sian bultenon *Liberecana Ligilo*, oni alvokas al refondiĝo de la Socialista, daŭriĝas la Sennaciista, ktp.)

Oni devas gratuli la OKKanojn (de la grupo ILO de sudpariza urbo Kastelforto) kaj aliajn kunlaborantojn, pro ilia strebo kaj sukceso, ĉar estis gravaj problemoj nek en la kongresejo nek en la restadejo nek dum la ekskursoj. La tre riĉan libroservon prizorgis SAT-Amikaro. Kaj ĉiuj faris sian eblon por kontribui al la sukceso de la kongreso, kio vere okazis. Neniu dubas, ke ekzistas bezono de tiaj kongresoj ne tiom neutralaj aŭ senimplikaj kiaj estas tiuj de UEA aŭ aliaj esperantaj organizoj. Venontjare SAT-kongreso okazos en Kazanlako, Bulgario, en fama Valo de Rozoj.

**Deklaracio**

La 80-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninte en Antony (apud Parizo) de la 21-a ĝis la 28-a de julio 2007 substrekas, ke nia Statuto instigas la membrojn de SAT agadi sur diversaj terenoj, kaj ĉi-jare atentigas la membrojn pri apartaj terenoj. La Kongreso:

- apogas en ĉiuj landoj la apartigon inter la ŝtato kaj la eklezioj kiel bazon de reala demokratio;
- subtenas la agadojn por alternativa ekonomio, kiuj celas pli al homara utileco ol al profito;
- proponas, ke ankaŭ ĉi-jare SAT sendu protestan leteron al la ambasado de tiuj landoj, kiuj ankoraŭ ne subskribis la Konvencion de Otavo;
- subtenas la batalon de ICBL (*International Campaign to Ban Landmines* - Internacia Kampanjo por Malpermesi la Kontraŭpersonajn Minojn), kiu agas por la universaligo de la Konvencio de Otavo;
- subtenas ĉiujn agadojn por alveni al traktato, kiu malpermesos la uzon, la produktadon kaj la stokadon de pafaĵoĵetoj el bomboj;
- subtenas, kun aparta atento al la kazo de nia kamarado Sekvojo, ĉiujn agadojn celantajn aboli la mortopunon en la landoj, kie ĝi ankoraŭ ekzistas.

**Gvidrezolucio**

La 80-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninte en Antonio (apud Parizo) de la 21-a ĝis la 28-a de julio 2007:

- taskas la Plenum-Komitaton difini la aperritmon de *Sennaciulo* en interkonsultiĝo kun la redakto-skipo;
- konstatas, ke la Plenum-Komitato portas la ĉefan respondecon pri redaktado kaj eldonado de *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo*, kaj gvidas la redakto-skipon inkluzive la ĉefredaktoron; ĝi alvokas la membrojn pli vigle kontribui al la organoj de SAT;
- rekomendas eksperimente enkonduki reprezentanton de ĉiu SAT-rondo en la ĝeneralan Konsilantaron (ĝK-aron); la reprezentantoj estu tuj allasitaj al la dissendolisto de la ĝK-aro, sed ne havos voĉdonrajton en kazo de balotado;
- komisias la Plenum-Komitaton kunvoki laborgrupon, kiu esploru la teknikajn problemojn de la KD-igo de *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV), la konsekvencojn de ĝia eventuala estonta enretigo kaj ĝian estontan poluradon;
- proponas, ke la LEA-Komitato kaj la Poresperanta Fako, cele al kunordigado de siaj komunaj agadterenoj, dum la estonta kongreso de SAT kunsidu en komuna forumo;
- instigas la membrojn liveri informojn pri siaj personaj interesoj kaj agadkampoj, cele al kompletigo de la SAT-Adresaro per indikoj, kiuj plifaciligu la kunlaboron de la membraro;
- alvokas al ĉiuj anoj informi la PK pri ĉiuj eblecoj transpreni diversajn taskojn priskribitajn en la klarigo pri la administrado, precipe se ili mem kapablas ion transpreni, aŭ konas iun alian taŭgan.

# PORPACA AGADO

Dum la pasintjara kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) estis lanĉita kampanjo kontraŭ la fabrikado, stokado kaj utiligo de la pafaĵoĵetoj el bomboj, tio estas, de tiuj armiloj kiuj dissemas bombidojn en la tereno, kiuj povas kaŭzi la vundiĝon de la civila loĝantaro. Ili povas resti dum multe da tempo en la tereno, kaj okazigi mortojn kaj vundojn eĉ jarojn post la lanĉo. El ili la plej konataj estas la t.n. Grapolbomboj. Kiel konsekvenco, SAT fariĝis ano de la *Tutmonda Koalicio kontraŭ la pafaĵoĵetoj el bomboj*, kaj ĉefe la pacista frakcio multe klopodis por helpi en la malpermeso de tiuj armiloj.

Antaŭ kelkaj semajnoj estis lanĉita en Hispanio specifa reta kampanjo por peti al la hispanaj Registaro kaj Parlamento la senkondiĉan apogon por malpermesi la armilojn en venonta konferenco. Nia asocio aperas kiel unu el la subtenantoj de la kampanjo.

La iniciato estis sufiĉe sukcesa, ĉar la registaro promesis sian apogon por la malpermeso de la bomboj. Sed ni daŭrigos nian kontrolon: ne sufiĉas belaj vortoj.

# KURSOJ

Kun la komenco de la studkurso en la norda hemisferio, komenciĝas ankaŭ la kursoj de Esperanto. La kurson en Madrido gvidas nia kamarado Pedro Hernández. Kompleta listo en:

**http://www.nodo50.org/esperanto/kursoj.htm**

# ALIAJ INICIATOJ

» La numero 52 de la alternativa hispana revuo "Diagonal" publikigis artikolon pri Esperanto, redaktitan de nia kompano Pedro Sanz. La titolo: "El esperanto, un idioma militante" (*Esperanto, batalanta lingvo*). Legebla en http://diagonalperiodico.net/article3590.html (en la hispana), jen konkludo de la teksto

> *La apogo de la alternativaj sociaj movadoj al la utiligado de Esperanto permesus eskapi el la lingva logiko de la kapitalismo, de la lukto porla lingva superrego kiel integra parto de la tutmonda alfrontiĝo.*

» La teksto pri *La utiligado de la lingvo esperanto dum la Hispana Intercivitana Milito*, kiu estis prezentita en novembro pasintjare en Internacia Kongreso pri tiu historia okazaĵo estas nun legebla en la hispana, la kataluna kaj Esperanto en nia retpaĝaro. Ĝi estis ankaŭ pretigita kiel *Dokumento 06* de nia serio, kaj estas mendebla paperforme al nia adreso.

» Daŭras la traveturo de la ekspozicio pri la "Liberecana memoro" tra la ĉefaj urboj de Hispanio. La teksto pri Esperanto kiu troviĝas en la katalogo kaj kiu pretigis Eduardo Vivancos, estas ankaŭ trovebla nun en nia retpaĝo, en la adreso: http://www.nodo50.org/esperanto/memorialibertaria.htm

# KULTURO




Nova filmo de la teamo kiu prizorgis la sukcesan "Gerda malaperis – La filmo". Denove ĝi estis produktita de *Imagu Filmo*, el la brazila urbo Formiga.

Ĝia nomo estas "La patro", kaj baziĝas nun sur malnova japana rakonto

En Hispanio peras ĝin nia kamarado Pedro A. Hernández Úbeda. Oni povas ĝin mendi en la adreso esperantio@ono.com.

Grava novaĵo en nia perado estas la apero de la nova vortaro hispana-Esperanto **"Amika"**, verkita de Miguel Gutiérrez Adúriz, kaj prezentita en la lasta hispana Kongreso de Esperanto, kie nia asocio denove zorgis pri la Libroservo.

Pliaj libroj, diskoj kaj filmoj, en:

**http://www.nodo50.org/esperanto/libroservo.htm**

Kaj nun ankaŭ gluaĵoj kaj T-ĉemizoj!

---

**Por kontakti kun ni:**

**SAT-en-Hispanio (SATeH)**
Poŝtokesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid
esperanto@nodo50.org
http://www.nodo50.org/esperanto